3.1. "Rektumo" (latine *rectum*) estas laŭ NPIV (2002) la lasta parto de la dika intesto, kvankam la fundamentaj adjektivo **rekta** kaj substantivo **rekto** trafe elvokas la **formon de la intestoparto**. Kial do rekto ne servu ankaŭ anatomie, apud la nocio geometria?

3.2. La neŭtran finaĵon **UM** de la latina deklinacio *Zamenhof* nenifoje konsideris kiel radikparton. Ekzemple la substantivon *verbum* li esperantigis **verbo**, ne "**verbumo**", ĉar li sciis, ke ankaŭ la ceteraj lingvoj apogas lian procedon: angle kaj rumane *verb*, germane *Verb* (tamen ankaŭ *Verbum*), france *verbe*, itale, hispane kaj portugale *verbo*.

3.3. Ke tiu **UM** ne apartenas al la radiko nepre montras la derivaĵoj: **rektalgio** (doloro de la rekto), **rektotomio** (ĥirurgia forigo de la rekto), **rektitido** – laŭ NPIV "rektumito" – (inflamo de la rekto), **rektoskopio** kaj rektoskopo (laŭ NPIV "rektumoskop(i)o", spite al la tutmonde kodigita terminologio!), **rektostenozo** (mallarĝiĝo de la rekto), **rektostomio** (ĥirurgia elkonduko de la rekto).

3.4. Mankas loko por elnombri ĉiujn neoficialajn **UM**-aĵojn el medicino, ĥemio kaj aliaj sciencoj. NPIV (2002) aplikas tiaspecajn misformojn tute arbitre. Por teni sin en anatomio, oni komparu du ostojn: la zamenhofan sakro (*os sacrum*) kun la NPIVa "sternumo" (*sternum*). Ĉu sufiĉas? Por pliaj detaloj, interesato turnu sin al *Kavka* (1996, 2003).

Referencoj

Bokarev E.A. (1974). Esperanta-rusa vortaro. 288 p. – Soveta Enciklopedio. Moskvo.
Kavka J. (1996). Kontribue al PIV. Homonimoj en Esperanto, konsiderataj nomenklature. 32 p. - *KAVA-PECH, Dobřichovice.*
Kavka J. (2003). Scienca Vortaro de Esperanto (akompane al "La nova PIV 2002"). Scienca Revuo, Vol. 54, Kajero 1, 56 p. – *Eschwege.*
Kraft K. (1998). *Česko-esperantský slovník.* 496 p. – *KAVA-PECH, Dobřichovice.*
NPIV (2002). La Nova Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto (2002). 1264 p. – Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT), *Paris.*

Adreso de la aŭtoro

Dr. Josef KAVKA
Lužná 7 – Vokovice
CZ – 160 00 P r a h a 6 / ĈEĤIO

Priaŭtora informo

Profesia petrologo, emerita sciencisto, multfaka naturscienca spertulo kaj profundkora esperantisto.

Bazaj scioj pri Esperanto-Literaturo*

I. La unua periodo inter 1887 kaj 1918

Peter ZILVAR

Lingvo, literaturo kaj kulturo

Ofte la Esperanto-movado (tute egale kiel oni difinas ĝin **kaj** ĉe ĉiaj elastecaj **kaj** ĉe specialaj elformiĝoj) neglektas „niajn kulturajn radikojn". La literaturo nepre apartenas al Esperanto. Ekzemple la studfako **anglistiko** tute ne estas imagebla sen la anglalingva literaturo. Ĉe seriozaj universitataj studfakoj pri Esperantologio aŭ Interlingvistiko inter aliaj la literaturo nepre apartenas al la deviga studado. Feliĉe Esperanto disponas pri relative granda kultura agado dum la pli ol centjara historio.

En ĉiuj kontinentoj ekzistis kaj ekzistas valoraj kulturaj kontribuoj. Certe oni ne povas detale priskribi tion sur nur kelkaj sciencrevuaj paĝoj. En Brazilo aperas la kultura magazino „Fonto", en Ruslando (nun en la urbo Kaliningrado) „La Ondo de Esperanto", kaj en Svislando „Literatura Foiro". Ofte aperas en „niaj kulturaj magazinoj" ankaŭ prozo aŭ poemoj el la 1-a epoko de la Esperanto-literaturo.

Kutime la „Esperantaj civitanoj" legas aktualajn romanojn. Grandaparte temas pri tradukoj el etnolingvoj de elstaraj naci(lingv)aj aŭtoroj. Bedaŭrinde la originala verkado ne tiom oftas, kvankam la esprimkapablo de Esperanto havas tre grandan, eĉ neelĉerpeblan potencialon. Krom la „hereditaj nacilingvaj trajtoj", la Internacia Lingvo havas ja propran kreopotencialon, i.a. pro la afiksoj kaj logikaj derivebloj. Ĝi invitas al propra verkado kaj ofertas relative egalrajtajn kaj neŭtralajn bonŝancojn por ĉiuj homoj sur la vasta terglobo. Ĉiukaze la etnolingvoj kaj la literaturo koincidas kaj estas nepre kohere kunligataj.

---

* Dosiero por studantoj kaj observantoj pri "Klerigado por Esperanto-instruistoj kaj kursestroj" okaze de la 3-a studadsesio en *Herzberg am Harz*, la 2-an kaj 3-an de decembro 2000

Iom pri la ĝenerala literaturo kaj ties historio

La literaturhistorio okupiĝas pri la historiaj kuntekstoj kaj la evoluadoj, kaj krome pri la prezentado de la diakrona evoluado de nacia kaj la transnacia, t.n. „internacia" literaturo.

Laŭ la regionoj de la mondo ekzistis diverstipaj literaturaj evoluoj. Ekzemple la sanskrita lingvo, kiu funkciis kiel tuthindia literaturskribo kaj literaturlingvo ebligis i.a. la kreadon de la „vedoj". Almenaŭ la hindeŭropa lingvofamilio havas parencajn lingvojn kaj kulturtrajtojn. Ni scias pri la verkoj de Homero, ekz. pri Iliado, kiujn li verkis en la 8-a jarcento a.K. La greka poetino *Sappho*, kiu verkis ses jarcentojn antaŭ Kristo, postlasis same grandajn verkojn, kiel ekz. la poemo „himno".

La romianoj Horacio (*Quintus Horatius Flaccus*, 65-8 a.K.) kaj Katulo (*Caius Valerius Catullus*, ĉ. 87-54 a.K.) iom antaŭ Kristo verkis en la latina lingvo (i.a. „*Carmina*"). Ankaŭ la ĉinoj havis la faman poeton *Li Tai-Pe* (701-762 p.K.). *William Shakespeare* (1564-1616) ekz. kun la elstara verko „Hamleto" estas mondfama poeto el Britio. *Thomas Moore, Lord George Noel Byron* (1788-1824) el la brita skolo postlasis neforgeseblajn verkojn por la t.n. mondliteraturo. Inter aliaj la rusoj *Puŝhkin, Lermontov, Tolstoj* (cetere la fama Tolstojo estis mem Esperantisto) eterniĝis sur la kampo de la literaturo, kiuj elstare verkis lirike. Kompreneble la skandinavaj landoj, Usono, Francio, Hispanio, Italio, Nederlando, Pollando, Hungario, Hindio k.t.p. havis elstarajn poetojn.

En „Germana Antologio" oni trovas elektitajn verkojn de famaj poet(in)oj. La fruĝermanan epokon (-753 p.K.) ekzemplas „Sorĉformuloj de Merseburgo" kaj la „Hildebrand-kanto". La „tempo de la Karolidoj kaj Otonidoj" (763-1024 p.K.) prezentas la „Valtaran Eposon" kaj famigas la poetinon *Rosvita von Gandersheim*. La „tempo de la Trobadoroj" (1050-1250 p.K.) sekvas, kaj kiu dum frekventado de la lernejo ne aŭdis pri *Walther von der Vogelweide, Wolfram von Eschenbach*? La „Malfrua Mezepoko" (burĝa kaj klerika literaturo, ĉ. 1250-1400) kun *Mechtild von Magdeburg* kaj „*Meister Ekkehart*" reprezentas tiun literaturan epokon.

La Renesanco (= re-naskiĝo) kaj Humanismo (1400 ĝis ĉ. 1517) „produktis" kun *Johannes Reuchlin* (1517-1620), *Martin Luther, Thomas Müntzer, Hans Sachs* k.a. la germanan pensadon kaj evoluadon. Dum la „Baroko" (1620-1700) elstaris i.a. *Paul Gerhardt, Johann Scheffler, Liselotte von der Pfalz, Gottfried Wilhelm Leibniz*. Sekvis la „Epoko de la Racionalismo" (*Aufklärung*, 1720-1785). La „Antaŭklasikismo" (ekde 1750) kun fama verkisto *Gotthold Ephraim Lessing* kun sia elstara vero „Natano la saĝulo" restos neforgeseblaj. Sekvis la "sturmimpulsa" periodo ("*Sturm und Drang*") ekde 1770. La „*Klasikismo de Weimar*" (ekde 1786) „kreadis" eble la plej famajn germanajn verkistoj, nome *Goethe* kaj *Schiller*. Sekvis la „Romantiko" kaj „bidermajra stilo". Ni ŝuldas dankojn por la periodo de la „Realismo" (ekde 1850) al niaj famaj germanaj poetoj kiel *Gustav Freytag, Theodor Storm, Theodor Fontane, Wilhelm Raabe*, kaj la „Naturalismo" (ekde 1880) kun *Gerhart Hauptmann* kiu i.a. postlasis la elstaran verkon " La Teksistoj". La germanoj, certe fieras pro *Johann Wolfgang von Goethe, Friedrich von Schiller, Heinrich Heine, Ludwig Uhland* kaj multaj aliaj. Precipe la verkoj de *Goethe, Franz Kafka* kaj aliaj famaj verkistoj kaj poetoj „varbas" por Germanio, por la germanaj lingvo kaj kulturo en la vasta mondo. Nepre menciindas, ke nemalmultaj judaj germanoj famigis la germanan literaturon mondvaste. Ĉu la germana lingvo aparte bone taŭgas por prezenti la grandan subtilecon kaj fajnecon, por pli bone esprimi la vastan gamon de la homaj sentoj, kiuj kreskas en kaj el niaj (humanaj) cerboj kaj koroj? Laŭdire la germanaj kaj germanlingvaj verkistoj eĉ literaturkritikistoj kiel nia germana „literaturpapo" *Marcel Reich-Ranicki* supozigis aŭ eĉ asertis tion kelkfoje. Ĉu ŝajne ekzistas ia germana „gvidkulturo" sur tiu kampo? Temis pri ofta kapvorto el la jaro 2000 en Germanio. Evidente oni ankoraŭ devas diserigi aŭ pridiskuti ĝin laŭ la diversspecaj interpretebloj. Ĉar supozeble kaj prave aliaj etnolingvoj same fieras pro propraj etnoliterturaĵoj kaj ties poetoj.

La unua epoko de Esperanto-literaturo aŭ la „klasika periodo" de Esperanto (inter 1887 – ĉ. 1918)

„D-ro Esperanto. Lingvo Internacia. Antaŭparolo kaj Plena lernolibro. Por Rusoj. Prezo 15 kopekoj. Varsovio. Tipo-litografejo de *H. Kelter, str. Nowolipie No. 11*, 1887" – tiel titoliĝas la malgranda 28-paĝa broŝuro en la rusa lingvo, kiu aperis la 26-an de julio 1887 en Varsovio. Tio estis kvazaŭ la naskiĝhoro de Esperanto. La pseŭdonomo „D-ro Esperanto" devenis de la juna varsovia okulkuracisto *Ludvik Lazar Zamenhof*. Normale oni devus nun okupiĝi detale pri

ties biografio kaj pri la sociaj kaj historiaj fonoj, kaj pri la lingvo mem. Ni nur mallonge priskribas la plej gravajn etapojn de la libroeldonado.

La dua Esperanta Libro, nome por Poloj, aperis la 6-an de septembro 1887. Sekvis tuj la 3-a por Francoj kaj la 4-a por Germanoj. Tiu 4-a libro titoliĝas: „*Dr. Esperanto. Internationale Sprache. Vorrede und vollständiges Lehrbuch* por Germanoj, 1887". Sekvis broŝurforme, ankoraŭ en 1887, Vortaro por Rusoj, Vortaro por Poloj, Vortaro por Francoj, Vortaro por Germanoj, k.t.p.

La "Dua Libro" jam enhavis, krom antaŭparolo, lingvajn ekzercojn, (i.a. la „Patro Nia", "El la Biblio", "Letero", "Mia penso", "El *Heine*", "Ho, mia kor'") kaj aliajn temojn, ankaŭ la „promeson". Tiu promeso havis sekvan tekston: „Mi subskribita, promesis ellerni la proponitan de d-ro Esperanto lingvon internacian, se estos montrita, ke dek milionoj personoj donis publike tian saman promeson. (Subskribo)". „La Promeso" sonas kvazaŭ kiel utopia romano.

Kompreneble dum la unuaj jaroj la kreinto kaj inciatoro de Esperanto, nome *L.L. Zamenhof* mem, verkis originale en la nova lingvo. Li donis la gramatikan kadron kaj la lingvajn modelojn por la lingvouzantoj. *Antoni Grabowski* trovis jam en 1887 la „Unuan Libron" kaj tuj eklernis Esperanton. Por elprovi la novan lingvon, li tradukis „La neĝa blovado" de *Puŝkin* en Esperanton. *Leopold Einstein*, ĵurnalisto en *Nürnberg*, jam delonge okupiĝis pri mondlingvo: li estis volapukisto sed tuj rimarkis la grandajn avantaĝojn de Esperanto kaj argumentis en gazetaro: "... ĉar oni ne povas revi pri pli simpla gramatiko, kaj nenia vortaro povas havi pli logikajn principojn...". *Einstein* eldonis la unuan esperantlingvan gazeton de la mondo („La Esperantisto"), kiu enhavis jam la unuajn etajn verkojn de la komenciĝinta literaturo en Esperanto. Bedaŭrinde jam en 1889 *Einstein* mortis, sed feliĉe la samgrupano *Christian Schmidt* daŭrigis la gazeteldonadon.

Kvankam la kreado de Esperanto kaj la evoluhistorio de la Esperanta literaturo ne tute kompareblas kun la evoluado de etnolingvaj literaturoj kaj kulturoj, en la „Klasika Periodo" de la Esperantoliteraturo la etnolingva Realismo kaj la Naturalismo estas evidente videblaj. Bedaŭrinde ĝis la hodiaŭa tempo la faklingvo, ekz. por sciencaj celoj, nur ludas preskaŭ sensignifan rolon kompare kun la „normala literaturo". Iom pri la literaturo de la unuaj jardekoj vi spertos en la sekvaj ĉapitroj.

Tradukita literaturo en Esperanto

La traduka literaturo en Esperanto estas aparte riĉa. Kompreneble la literaturo de potencaj landoj haveblas en tradukita formo en multaj naciaj lingvoj. Ofte tamen ekonomie malfortaj nacioj feliĉe eldonis siajn naciajn literaturtrezorojn en Esperanto. Krome per la tradukado de nacilingvaj literaturaĵoj en la Internacian Lingvon ekestas konkurado inter la diversaj etnokulturoj. Almenaŭ ĉe poeziaj verkoj ekzistas jam relative granda stoko. Ĝis 1904 apenaŭ ekzistis libroeldonoj, ĉar la esperantlingvaj homoj estis malmultaj. *Kazimierz Bein* (pseŭdonomo: *Kabe*) jam en 1906 aperigis Polan Antologion. De la fratoj *Grimm* li tradukis ankaŭ „Elektitajn fabelojn" kaj de *Turgenjev* „Versaĵoj en prozo" kaj „Patroj kaj Filoj".

Kabe estis tre aktiva kaj elstara talento, kiu kreis malpezan lingvostilon, tamen ne tro esprimriĉan. Bedaŭrinde post kelkjara ege aktiva kaj sukcesa agado li retiriĝis en la jaro 1911. Ĝis hodiaŭ oni uzas la verbon „kabei" por situacio, ke homo estas tre aktiva kaj talenta por Esperanto – kaj subite ĉesas. Oni povas diri, ke la Klasika periodo estis „la fazo de orienteŭropaj landoj". *Kabe* tradukis la trivoluman romanon „La Faraono" de *Boleslaw Prus*. „*Quo vadis*" kaj „Noveloj" de *Henryk Sienkiewicz* tradukis *Lidja Zamenhof*, filino de „d-ro Esperanto".

Antoni Grabowski estis ekde 1888 ĝis la morto de *Zamenhof* en la jaro 1917 ĉiam lia bona amiko. De la komenco li parolis nur Esperante kun la kreinto de Esperanto. Ofte ili interparolis, kaj *Zamenhof* donis bonajn lingvajn konsilojn – kaj ili kune kreis novajn vortojn por tiutempe ankoraŭ ne esperantigitaj nocioj. Tiamaniere ili evitis erarojn. En siaj lastaj vivojaroj *Grabowski* por la amikoj de Esperanto kreadis sian plej bonan tradukverkon „Sinjoro Tadeo" (pole: *Pan Tadeusz*) de la fama pola aŭtoro *Adam Mickiewicz* laŭ la originala metriko en 13-silabaj versoj kun duopaj rimoj. „Sinjor' Tadeo" estas la nacia pola epopeo.

La kvarvoluma verko respegulas ne nur la eksterordinarajn kapablojn kaj de *Antoni Grabowski* kaj de la logiko de la Internacia Lingvo mem. La versoformo kaj la enhavo fidelas al la originalo. Tio fariĝis la ĉefverko de *Grabowski* kaj li ricevis la epiteton „patro de la Esperanto-poezio". Ĉion li faris en interkonsento kun *Zamenhof*. *Antoni Grabowski* tradukis i.a. ankaŭ poemojn el 30 lingvoj kaj li kolektis tion en „El Parnaso de Popoloj".

Aliaj famaj aŭtoroj el la frua fazo esti i.a. *de Wahl, Kofman, L.E. Meier, Devjatnin*. Ankaŭ la iniciatoro de Esperanto tradukis i.a. „Georgo Dandin", „Ifigenio en Taŭrido" kaj „La Rabistoj" de *Schiller*, „La Revizoro" de *Gogol* kaj „Marta" de *Eliza Orzeszko*. Nur iom antaŭ la Unua Mondmilito kaj antaŭ sia morto *Zamenhof* fintradukis la Malnovan Testamenton el la hebrea lingvo. *L.E. Meier* tradukis „*Wilhelm Tell*" de *Schiller* kaj *Devjatnin* el Ruslando diversajn verkojn de *Puŝkin, Gogol* kaj *Krilov*. Ankoraŭ dum la unua jardeko ĝis la Unua mondmilito en multaj landoj ekkreskis literaturkreantoj.

Originala literaturo en Esperanto aŭ „La primitiva romantikismo" (1887-1918)

Nur en 1885, post multaj provoj kaj tradukoj el diversaj lingvoj, por *L.L. Zamenhof* (supozeble ankaŭ laŭ la rekomendo de lia lingvosperta patro *Marko Zamenhof*) la lingva kreado de la Internacia Lingvo jam estis sufiĉe matura. Jam en antaŭa ĉapitro prezentiĝis iom pri la frua literaturo en Esperanto. Kiam en 1887 aperis la Unua Libro de Esperanto, ĝi jam enhavis, krom tradukaĵoj, ankaŭ du orginialajn poemojn: „Ho mia kor' " kaj „Mia penso", kiuj ankoraŭ hodiaŭ elradias tipe esperant(ist)stilan poezion. Do, tio estis kvazaŭ la embria debuto kaj modelo por la originala literaturkreado.

Aliaj originalaj poemoj de *Zamenhof* estis „La Vojo", „La Espero", „Preĝo sub la Verda Standardo". Ekde 1905 aperis la unuaj originalaj poemaroj, ekz. Verdaj Fajreroj (1908) de *Romano Frenkel*. Ĝis la Unua Mondmilito la kolektoj estis de *Dombrovski, Felix Zamenhof* (frato de *L.L.Zamenhof*), *Kozlowski, Privat, Styler* kaj nemalmultaj aliuloj.

La ĉeĥo *Stanislav Schulhof* (1864-1919), dentkuracisto, verkis la poemkolektojn „Per espero al despero" (1911), „Kion la vivo alportis" (1912). Konstanta evoluo kaj perfektiĝo estas videblaj. La ruso *Vasilij Nikolajevic Devjatnin* (1862-1938), instruisto pri latina kaj rusa literaturoj, verkis senĉese. Ne nur lernolibrojn kaj nemalmultajn tradukojn ni dankas al li, sed li ankaŭ kreis originalaĵojn. Li verkis i.a. por „La Esperantisto" kaj por „Ondo de Esperanto", ekz. li kreis la originalajn komediojn: Edziĝo, Nefinita dramo, La instruita mimikisto. En la jaro 1896 aperis de li la versa rakonto Nevola Mortiginto kaj liaj literaturaj verkoj aperis en kvar volumoj de Plena Verkaro (1906-1911).

Leo Belmont, pseŭdonomo de advokato *Leopold Blumental*, loĝis en Varsovio kaj laboris kiel redaktoro de pollingva literaturgazeto. Li verkis ankaŭ kelkajn famajn romanojn en la pola lingvo. Por Esperanto li estis sukcesa aktivulo, bonega oratoro kaj aŭtoro de pola kaj de Esperanta gazetaro. Li verkis mnemonikan gramatikon en versformoj, kaj en 1908 aperis „Sonoj Esperantaj" libroforme.

Menciindas almenaŭ ankoraŭ la germandevena brita aŭtoro *Heinrich August Luyken*. En 1864 li naskiĝis en *Allenkirchen* kaj frekventis gimnazion en *Düsseldorf*. Post translokiĝo al Britio kaj edziĝo al britino li, en 1904, konatiĝis kun Esperanto kaj tuj entuziasme propagandis Esperanton kaj elstare poetis. Li verkis „Paŭlo Debenham" (1912), „Mirinda Amo" (1913), „Stranga Heredaĵo" (1922) kaj „Pro Iŝtar" (1924). Ĉiuj originalaj romanoj estis verkitaj laŭ la sama unuforma skeleto. Inter la ĉefagantoj ĉiam troviĝis unu, kiu devis defendi sian kristanan kredon kontraŭ herezaj delogoj aŭ pro personaj malfeliĉoj. Per tio la kristana aŭtoro volis varbi por severa kristana kredo.

Cetere la Internacia Verkista Asocio estis fondita dum la 7-a Universala Kongreso en Antverpeno. Prezidantino fariĝis la fama aktivulino *Marie Hankel* el Dresdeno.

Kongresparoladoj de *L.L. Zamenhof*

Normale, kongresparoladoj ja ne nepre apartenas al la literaturo, sed ĉe Esperanto estas tute alia afero, ĉar ja temas pri prae planita lingvo. Do, ĝis la jaro 1905 oni uzis Esperanton preskaŭ nur en skriba formo. Nur kelkloke ekzistis la unuaj Esperanto-grupetoj, kie eblis jam interparoli. Ekzemple en Varsovio jam estis frua grupo, kaj *Zamenhof* praktikis tie la parolan lingvon, same kiel en sia familio mem.

Tamen Esperanto nur vere sukcesis kiel parola lingvo ekde la Unua Kongreso en Bulonjo-ĉe-Maro. Por *Zamenhof*, Esperanto ja ne nur estis lingvo, sed laŭ „interna ideo" la ilo por humaneco kaj interfratiĝo ktp.

Do, centoj da homoj spertis por la unua fojo la belsonecon kaj esprimkapablon dum la Unua Kongreso en *Boulogne-sur-Mer*. Zorgeme *Zamenhof* antaŭe preparis la prelegtekston. La kortuŝaj vortoj de la kreinto de Esperanto pozitive infektis la partoprenantojn de la Unua Kongreso.

Ankaŭ la sekvaj kongresprelegoj de *Zamenhof* en Ĝenevo (1906), Kembriĝo (1907), Dresdeno (1908), Barcelono (1909), Vaŝingtono (1910) k.t.p. estis tre emociantaj kaj modeldonaj, kaj li ĉiam direktis la laŭsituaciajn vortojn por taŭgaj celgrupoj. Fojfoje tio sonas kiel poezio. Certe foje vi trovos tempon, por legi la aliajn kongresparoladojn, kiujn oni ankaŭ povas analizi kaj pridiskuti.

Personaj opinioj pri la verkado en Esperanto

Esperanto estas neŭtrala lingvo kaj pontas inter la diversaj kulturoj. Do, unue oni devas legi multajn bonajn verkojn en Esperanto. Originalaj verkoj, ekz. ankaŭ el la „Klasika Periodo" en Esperanto de niaj elstaraj verkistoj, kiuj kreis propran stilon, estas bonegaj studmaterialoj por sperti bonan „klasikan lingvon". Esperanto havas same kiel la etnaj lingvoj propran karakteron kaj stilon. Ofte metafore nacilingvaj stilformoj transiras kvazaŭ aŭtomate en Esperanton. Lingvojn oni ne povas perforti. Ĉiu lingvo havas proprajn historie kreskintajn stilojn kaj trajtojn. Modelaj romanoj kaj tekstoj pleje taŭgas por kutimiĝi al niaj kulturaj radikoj. Preskaŭ ĉiuj artformoj universaliĝas. Eĉ la muzikformoj en la plej diversaj regionoj de la mondo nuntempe preskaŭ perdis la lastajn regionajn stilapartenaĵojn.

Nur la literaturo estas la lasta granda bastiono por defendi sin – kaj nin – kontraŭ la totala „internacia" fremdiĝo. Mi ne volas nomi la momentan superŝtaton, kiu invadas kaj platigas preskaŭ la lastajn netuŝitajn kulturterenojn. Esperanto kiel planita neŭtrala kaj komuna lingvo („nia dua lingvo") havas, ekde la komenco, la funkcion protekti la etnajn (naciajn) lingvojn kaj kulturojn. Ĝenerale ĉiuj civitanoj havas la samrajtajn bonŝancojn, interkomuniki en la neŭtrala komuna pontlingvo sen iaj lingvaj hegemonioj.

Fakte ĉiu povas verki en la terenoj de la sciokampoj kaj sciencoj, kiujn li aŭ ŝi komprenas enhave kaj semantike. Esperanto aparte bone taŭgas por la literaturo, ĉar ĝi estas tre elasta kaj esprimkapabla, kaj la potencialo certe povas superi la spertojn kun la naciaj lingvoj – se pli da civitanoj scius kaj praktikus ĝin. Do, grandioza perspektivo, agi prospektive. Eble post certa tempo eĉ kelkaj gelegantoj kuraĝos esplori la jam grandegan verkaron en Esperanto, kaj certe ankaŭ iuj kuraĝuloj kaj talentuloj iam verkos en Esperanto. Volonte mi vetus! Do, kuraĝe antaŭen sur la kreema pado! (daŭrigota)

La rolo de insektoj en la studoj pri evoluo kaj naturselekto

Wendel TELES PONTES

Resumo

Studoj pri biologia evoluo kaj genetiko fariĝis per diversaj organismoj, kiuj donis bonajn kondiĉojn por ekhavo kaj analizo de konoj pri heredeco kaj naturselekto. El inter tiuj organismoj, la insektoj estis la plej uzataj. La "bananmuŝo" *Drosophila*, papilioj kaj skaraboj estis la plej bonaj makroskopaj organismoj por eksperimenti hipotezojn en genetiko: emfaze al evoluo, genetiko de la populacioj kaj naturselekto, kaj la rezulto de eksperimentoj. Uzante tiajn animalspeciojn oni tre kontribuis por plibonigo de la konoj pri la meĥanismoj de evoluado kaj heredado. La rolo de la insektoj dum studado pri evoluo, genetiko kaj naturselekto estas fundamentaj por starigi la bazojn de tiuj sciencoj.

Enkonduko

La klaso insektoj (*Insecta*) estas konsiderata la plej granda klaso je nombro da animaloj ekzistantaj nuntempe. Ni konas ĉirkaŭ 900 000 speciojn de insektoj (*Lara* k.a. 1979). Fakte 70% el la konataj animaloj estas insektoj, tiom granda estas tiu ĉi klaso.

Insektoj havas eksterordinaran vojon en la historio de la planedo. La motivo de ilia sukceso estas pro diversaj kaŭzoj, kiuj helpis ilin disvolvi rimedojn por transvivi ĝis la hodiaŭaj tempoj. Ili havas grandan adaptiĝkapablon (*Maranhão* 1977; *Lara* k.a. 1979), vivas en preskaŭ ĉiaj medioj kaj havas flugantajn reprezentantojn. Tiu karakterizo aparte respondecas pri la evolua sukceso de insektoj.

Flugi signifas pli grandan ŝancon fuĝi for de predantoj kaj trovi novajn lokojn pli favorajn al transvivo. Ankaŭ metamorfozon oni povas konsideri avantaĝo de la klaso, ĉar tial multaj insektoj havas pli ol unu vivejon dum sia vivciklo. Dum la larva vivperiodo ĝi vivas en akvo kaj dum la posta vivofazo al ĝi eblas flugi.